

NI KORE RECIPROKAS EN ĈIUJN MONDANGULOJN...

„Al Klub Esperantistů při Osvětové besedě ONV 2 v Praze.

Ni salutas vin okaze de l' Unuamaja festo, gesto de l' internacia laborista amikeco, solidareco kaj mondopaco. Ni kore deziras al vi sukcesojn en via laboro.

Esperanta rondeto de filologia fakultato de Moskva Universitato.“

----

R E S T U S M I

Kiu foje vin renkontas –  
Li vin amas sen mezur',  
ĉar el via brusto fontas  
la impeto al lazur'.

Restus mi en via lando  
ankaŭ mi ekamis ĝin -  
sed se mi eĉ mondo-rande  
ĉiam tiros min edzin.

Kaj mi restus Labe<sup>x/</sup>- borde  
Kiel frato ĉe fratín',  
se ne vokas min agorde,  
el patrujo kamp', uzín'.

Ŝi min vokos ĝojrigarde  
per okuloj el ceriz -  
kaj kor'mia altiras garde  
al komuna amo – ĉiz.

Vi rigarde min karesas -  
restus mi en via dom',  
sed hejmlanden – mi konfesas -  
min allogas roz – arom'.

Nu, mi restus Labe – borde  
kiel frato ĉe fratín',  
se ne vokas min agorde  
mia filo kaj filín'.

Kiu foje vin renkontas  
li vin amas sen mezur',  
ĉar en via brusto fontas  
la impeto al lazur'.

x/ Nomo de riviero en Ĉeĥoslovakio.

Canko M U R G I N,  
Bulgario

---

M A R Y Ŝ A - la duan fojon prezentita la 7-an de majo de nia Verda ĉaro de Julio Baghy en granda salono de Malgranda scenejo estis ĉiuflanke granda sukceso. Granda arto, plena, kontentem salono, gastoj el multaj malproksimaj lokoj (Třinec, Budějovice, Liberec, Poděbrady, ktp.). Sinceran dankon al vi, niaj artistoj!

EKP

---

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkáč 26 je la 20-a horo.

Programo:

- 16.5. THEODOR KILIAN /Třebíč/: La okupo de la militkaptitoj en Tomsk – Siberio /Malnovaj rememoroj/.
- 23.5. LADISLAV KYNČL: Deveno de la vegetalaj kuriozaĵoj.
- 30.5. JIŘÍ PASTOR: Novaĵoj de elektroteknika industrio.
- 4.6. Granda salono je la 19,30-a horo. Verda ĉaro de Julio Baghy prezentas la komedion de G. B. Shaw: Pygmalion.
- 6.6. FRANTIŠEK PYTLOUN /Poděbrady/: Esperanto kiel nervkuracilo.

---

**GRAVA ATENTIGO:**

La Verda ĉaro de Julio Baghy finos sian sukcesan ĉi jaran teatran sezonon per komedio de G. B. Shaw „Pygmalion“. La komedio estos prezentita tuta, t. e. sen iaj dramatikaj adaptoj, en ĉiuj personoj ordonitaj de la aŭtoro. La ĉefajn rolou transprenis gesamideanoj P. Sádlo, E. Suchardová, J. Ondráček, E. Řiháčková, I. Bartošíková kaj A. Seemann. La prezentado okazos ĉi foje l u n d e la 4-an de junio je la 19,30-a horo sur la scenejo de „Malá scéna“. Ĉar la teatraĵo estas eknadrigita en la teatran planon de Osvětová beseda, garantiu al vi ĝustatempe enirbiletojn en la antaŭvendo de la biletkaso de Malá scéna. Atentigu viajn gekonatulojn pri afiŝaj kaj gazetaj anoncoj, certe por ni ĝis nun nekutimaj kaj tiam des pli ĝojigaj!

---

**NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ**

En nia kluba poŝto amasiĝas dank- kaj salutletroj al familio Ginz. Ni tre ĝojas pro tiu ĉi fakto kaj publikigas hodiaŭ la unuan leteron de niaj geamikoj:

Sur la maro, inter Sicilio kaj Kreta, dimanĉe la 1-an de aprilo  
s/s Jerusalem

Karaj amikoj,

pasis nur malmultaj tagoj de post nia adiaŭo, sed al mi ŝajnas, ke mi travivis tutan epokon. Ni vidis tiom da eksterordinaraj aferoj, ni tiom aŭdis kaj sentis, ke estas por mi malfacile priskribi al vi eĉ nur etan parton de ĉio. Tamen mi klopodas:

Kiam do pasis kortuŝaj momentoj de nia disiro en Praha, ni ekveturis kaj nova audiaŭo atendis nin kun la samideanoj en Brno. Venas la limo – kontrolo de pasportoj – doganistoj. Ekscitigaj momentoj. Kvankam ĉiuj niaj aĵoj ĝis lasta poŝtuko estis enskribitaj, tamen en stacidomo en Praha ni ricevis tiom da donacoj de vi, karaj samideanoj, ke mi timis, ĉu mi povos kunporti ilin. Ĉio pasis en trankvilo – dogano kaj ankaŭ pasportkontrolo flankde de ĉeĥaj oficistoj. Ni forlasas la patrujon. Antipodaj sentoj movigas nian koron. Ĝojo kaj sopiro je nia infano alternas kun malĝojo kaj aflikto, nepriskribebla emocio. En la vagonaro aperas aŭstriaĵoj konduktoj. Unu el ili diras: „Ĵus vi pasis la feran kurtenon!“ Venas aŭstria oficisto por kontroli pasportojn. Estos por vi interese aŭdi kion kaŭzis tiam esp. insigno /tiu kun flago ĉeĥoslovaka/, kiun portis mia edzo sur sia sunuto. La oficisto, kiu konjektis, ke ĝi estas insigno de la partio, ekflamis kaj diris, ke ni devas tuj daŭrigi nian vojaĝon al Italio. Ni ne kontraŭparolis, nur ni rimarkis, ke ni en Vieno ankoraŭ demandos. Li respondis abrupte, ke ni ne estas ion demandontaj, sed ke ni devos forlasi Aŭstrion tuj, tujege. – Mia edzo ekdormas pro laciĝo – mi apogita sur lia brako silente ploras por ne vekti lin. Mi priploras Ĉeĥoslovakion, ĉion kaj ĉiujn karajn, kiujn mi forlasas.

Vespere ni atingis Vienon. Ni ne trovis tempon anonci nin ĉe vienaj esperantistoj. Ni devis esti atendataj de hebrea institucio en la stacidomo, sed pro ia miskompreno neniu estis tie. Nun ni staris en la stacidomo, meze

de niaj valizoj, sen monero. Kion fari? Ni interkonsiliĝas, iu ĉeĥo helpas nin, ni vokas izraelan konsulejon kaj de post tiu momento ni estas komplete kaj brile prizorgitaj. Oni forkondukas nin en belan hotelon kun ordono plenumi ĉiujn niajn dezirojn. Matene venas aŭto por veturigi nin en la konsulejon. Ni ricevas po 100 ŝilingoj por niaj malgrandaj elspezoj. Ni trovas niajn amikojn, pasigas kun ili la tagon. Ili gvidas nin tra Vieno. Ni admiras grandan trafikon en la urbo, belajn konstruaĵojn kaj relative malaltajn prezojn de ĉio. Por niaj 100 ŝilingoj ni povus aĉeti diversajojn, sed ni ne povas. Ĉie estis fermite – estas dimanĉo.

Ni adiaŭas Vienon vespere, tra neĝokovritaj Alpoj ni venoas tra Udine al Venezia, kie ni haltas sufiĉe longe. La loko, pri kiu mi revis jam ek de mia infaneco. Poste Padova, Verona, Milano, famaj urboj, ĝis nun konataj al mi nur el libroj. Ne estas priskribebla la lukso, kiun ni ĉie renkontas. Ni neniam sciis, ke ekzistas tiel brilaj elektraj trajnoj, tiel belegaj aŭtoj, tiel vestitaj homoj, virinoj kun tiom da juveloj. Tamen ni konfesas, ke ni vidis ankaŭ strikantajn laboristojn. En Ĉeĥoslovakio laboristoj ne strikas. De tie ni venis el Genova, kie ni restis du tagojn. Genova estas antikvega urbo, plena de interesaĵoj. Ni sentas nin kvazaŭ en alia mondo. Strange impresas inter la belaj palacoj ŝnuroj plenaj de sekiĝanta tolaĵo. Antaŭ nia fenestro staras monumento de Kolumbo, kies naskiĝdomon ni ankaŭ vidis. Krom tio altegajn kaj belajn nubskrapantojn. Tra la urbo kondukis nin Esperantistoj, vespere ni partoprenis kunvenon de la klubo. Apud mi sidis delegito de Nairobi en Kenio, kiu venis kuns ia familio viziti Eŭropon. Li rakontis, ke antaŭ proksimume 20 jaroj li estis en Praha, kie li konatiĝis kun esperantistoportanta la nomon Ginz. Vi povas imagi la surprizon kaj la aplaŭdon de samideanoj, kiam la du malnovaj amikoj ĉirkaŭbrakiĝis. Stranga hazardo, ĉu ne? Mia edzo parolis pri Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio kaj ankaŭ mi aldonis kelkajn vortojn. Poste ni enŝipiĝis en belan blankan ŝipegon kun nomo „Jerusalem“, kiu nin transportis al Marseille. Tie ni restis unu kompletan tagon. Estis nia sola halto en Francio. Ni observas vivon en la haveno, el ventro de nia ŝipo oni malŝarĝas novajn kaj novajn kestojn da izraelaj oranĝoj, dume ŝarĝas terpomojn, aŭtomobilajn partojn ktp. De tie ni veturis jam rekte Izraelon. La ŝipo estas belega kaj relative granda. 320 homoj laboras tie kaj da pasaĝeroj estas 1500. La personaro, de la kapitano ĝis lasta servisto, estas hebreoj kaj parolas hebrean lingvon. Estas utilege por ni, ke ni ĝin lernis. Estas ĉi tie hebreoj el ĉiuj mondpartoj kaj feliĉe ankaŭ multaj el ili konas la lingvon. Krome oni aŭdas ĉi tie plej diversajn lingvojn, eble ĉiujn eŭropajn, arabajn kaj aliajn. Kunveturas afrikaj hebreoj inter ili iuj kun majestaj blankaj barboj en blankaj manteloj kun kapuĉoj /laŭ araba maniero/, sed laŭ vizaĝoj aspektantaj kiel veraj bibliaj profetoj. – La maro estas relative maltrankvila, ŝanĝas sian koloron, jen estas griza, jen verda kaj denove blua. Survoje ni vidis unuflanke Korsikon, aliflanke Sardinion, poste sur maldekstra flanko Apeninan duoninsulon, sur la dekstra flanko Sicilion kun Messina kaj Calabria. Impresis nin la altegaj feraj mastoj, transportantaj elektran kurenton de la itala kontinento al Sicilio. Neniam ni aŭdis pri tiuj ĉi grandiozaj laboroj. La mara horizonto leviĝas kaj iras denove malsupren. Kun ĝi ankaŭ nia stomako – tamen, kredis, ke ni ĝis nun ne nutris la fiŝojn. Da ili estas verŝajne sufiĉe en la maro, ĉar ni ofte jam renkontis fiŝistajn barkojn, kaj ankaŭ svarmoj da flugantaj fiŝoj flugadas preter nia ferdeko. Ankaŭ Grekujon /la insulon Kreta kun neĝokovritaj montopintoj/, sed tio ŝajne estas la lasta tero, kiun ni renkontis. Ni ne scias, ĉu ni vidis Cipron, sed certe estas, ke ni jam morgaŭ estos en Haifa, celo de nia vojaĝo. Ni ambaŭ vin ĉiujn plej kore salutas – viaj M. Ginzová, O. Ginz.

P.S. Ni en ordo alvenis kaj estas jam kune kun niaj infanoj feliĉaj kaj kontentaj.



KIO OKAZIS, KION NI AŬDIS, KION NI LEGIS, NI INFORMAS...

LA DRAMO MARYŜA DE FRATOJ MRŜTÍK EN ESPERANTO

La 11-an de aprilo 1956 vidis la „Malgranda Scenejo“ de nia Klubo multajn vizitantojn ne nur el Praha, sed eĉ el malproksimaj provincaj lokoj. Inter ili estis ankaŭ neesperantistoj, kiun altiris la scivolemo vidi la faman dramon de fratoj Alois kaj Vilém Mrštík „Maryŝa“ en esperanta adaptor.

La solenan vesperon enkondukis s-anino Jiřina Holá per omaĝo al la Majstro, la kvinto de la paca instrumentopora interhomaj rilatoj, kaj s-anino Bartoříková, distingiga kiel talonta recitantino de la versoj /Kalocsay, Thorsen/.

La plej streĉa atendado estis memkompreno direktata al la ĉefprogramo de la vespero, la teatraĵo „Maryŝa“. Ni ĉiuj, intime ĝin konante el la profesiaj kaj diletantaj scenejoj kaj konsciante la grandajn pretendojn de la prezentado, metis al ni plurajn antaŭajn demandojn. La originalo ja estas ne nur animskua dramo, sed ankaŭ „bildo el la vivo de Moravia vilaĝo“, en parade disvolviganta revuo de folkloro. La aŭtoroj evidente opiniis grava, ke tiu ĉi flanko de la teatraĵo estu plejble bunta spektaklo. Tial ili donis detalajn instrukciojn ne nur por la karaktero de la dram-personoj, sed ankaŭ por ĉies vesto, konduto, mimiko; ili aldonis noton por la kantoj de la rekrutoj; kaj ili ankaŭ verkis la ludon en dialekto, uzante ĝin kiel instrumenton de la folkloro efekte, kiel elstaran dekoracion. Eĉ la plej grandaj scenejoj, ekzemple la Nacia teatro en Praha, ne povas prezenti la teatraĵon tute ekzakte laŭ la preskribo de la aŭtoroj kaj devas ĝin reĝisore redukti/ekz.: sur la scenejo ne aperas la veturilo kun jungitaj ĉevaloj, forportantaj la rekrutojn el la vilaĝo/. Sed krom tiu ĉi dekora kadro la teatraĵo havas sian internan dramecon rezultantan el la karaktero de la rolantaj personoj, nome la tragika historio de knabino, kiun la men-avidaj gepatroj versence vendas al riĉa egoisma kaj kruda vidvo nur tial, ke li posedas muelejon. Pro avareco ili senkompate kaj senskrupule frakasas la viv-feliĉon de sia filino...

Ĉu estas eble ludi tiun ĉi allogan, sed ampleksan tragedion en la miniaturaj kondiĉoj, pri kiuj disponas la „Verda Ĉaro de Julio Baghy“? S-ano Seemann sprito disglavis la nodon de la problemo: li rezignis pri la ekstera folkloro kadro, pri la statistaro kaj malĉefaj personoj, kaj koncentris sian atenton al la enhavo de la dramo mem. Tiel li povis redukti ĝin je ses ĉefroluloj /anstataŭ 30 personoj plus statistikoj/, sed ĉe ili li severe konservis la dialogojn, kiuj portas la ideon de la dramo ĝis la neevitebla tragika fino. El tiu ĉi eksperimento rezultis mirinda kompakta tuto, kiu ja ne enhavas la kompletan de la ludo laŭ la intenco de la aŭtoroj, sed plene respegulas la historion de la „bela Maryŝa“ kiun ni spektantoj sekvas kun retenata spiro.

Tamen la folkloro etoso, la atmosfero de la Moravia vilaĝo, kiu faras el la dramo verkon tipe nacian, ne malaperis eĉ el la Esperanta adapto. Ĝi rebrilis en la originalaj kostumoj, en ĉiu gesto kaj en ĉiu vorto de la aktoroj. La tradukintino Eva Suchardová umis fluan konversacian Esperanton kaj ne provis fari eraran kaj vanan eksperimenton, imiti la dialekton de la originalo, eble per ia deformita lingvaĵo. Nur per la konservo de la originalaj formoj de la interjekcioj kaj per ioma voĉnuanco de la rolantoj estis atingata la „loka koloro“.

El la modifo de la teatraĵo por la bezonoj de nia malgranda scenejo la plej grava kaj plej aŭdaca estis tiu, ke oni unuigis la rolon de Strouhalka /onklino de Maryŝa/ kun tiu de la gastejestrino /kiu samtempe transprenis ankaŭ kelkajn el la dialogoj de la gastejestro kaj de la patrino de Francek/. Ŝajnas, ke per tiu ĉi adapto deve suferis la konsekvenco de ŝia karaktero.

Laŭ la libro portas la dramataj okazaĵojn kaj akcelas ilin plej multe la rolo de Maryŝa kaj tiu de ŝia patro Lízal; kaj tiel estis ankaŭ en la prezentado de la Verda Ĉaro: La bienposedanto Lízal /Seemann/ estis malmola,

sian havaĵon amanta kaj obstina kampulo, kiu eĉ en la momentoj de la deprimigo neniam forgesas pri la graveco de la groŝoj... Lia filino, lia „bela Maryŝa“ /Eva Suchardová/, elludis la tutan skalon da emocioj: jen gaja, preskaŭ senzorga knabino, jen la esperon pedanta amatino, poste filino fleksiĝanta sub la dura volo de la gepatroj kaj edziniĝanta al viro, kontraŭ kiu staras ŝia koro; fine malesperanta edzino, luktanta kontraŭ la delegado de sia estéta amanto, ĝis peko vekigis en ŝia animo pro la besta brutaleco de la edzo, kaj ŝi faras la neripareblon, venenante lin...

KIAM VI LARMOJN VERŜAS...

Al aktorino Eva Suchardová

Unue la impresoj  
de ege belaj kruroj.  
Mi ĵurus, ke al ili  
fiksiĝis la okuloj.  
Detaloj: Harlinio.  
Ŝanĝema bril' de broĉo.  
Kaj tamen tre, tre baldaŭ  
nenio – nur la voĉo.

Via ton' tragedia!  
Iu poŝtukon serĉas.  
Ĉar estas vi unika,  
kiam vi larmojn verŝas...  
Jes, Eva, al vi rozojn!  
Bukedon grandan, sciuj!  
Kaj al la kor' vin premi  
kaj danki por ni ĉiuj.

Eli Urbanová

La egoisma muelisto Vávra /Pravoslav Sádlo/,  
altstatura fortika viro, senskrupule aĉetanta  
por si knabinon, kies juneco al li ekplaĉis;

poste superruzita de sia bopatro, kiu ne elpagis al li la doton,  
turmentas la edzinon, furiozas kontraŭ sia

rivalo, kaj fine pereas per la mano de Maryŝa...

Francek /Jiří Pastor/, juna rekruto, fidanta al sia  
amatino, ne volante vidi la abismon de la klasa  
diferenco, preta bendi, sed trompiĝanta.

La temperamenta sceno en la gastejo, kiam Francek

Post la reveno el la militservo renontiĝas kun Vávra

kaj minacas delogi lian edzinon, apartenis al la plej

fortaj momentoj de la dramo... Strouhalka /Eva

Řiháčková/, rolis la onklinon de Maryŝa kun sintruda

persvademo, kaj poste kiel la gastejstrino sciis tre

konvinke kaj malkaŝe disvolvi antaŭ Lízal la tutan

tragedion de Maryŝa, kaŭzitan nur pro la mon-amo.

Lízalka /L. Rejthárková/ estis dura, senkora patrino,

Eĉ ne unu bonan rigaudon havanta por Maryŝa, ĝis la

filino fleksiĝis kaj konsentis edziniĝi al Vávra.

La prezentado estis neforgesebla sukceso de nia teatra kolektivo kaj konvice pruvis, ke ĝi povus inde montri sin al la internacia publiko. Ĉu ĝi estos baldaŭ ebla? Pu.

----

Nia klubano, membro de la Verda Ĉaro de J. B., VIOLONĈELISTA VIRTUOZO Pravoslav S Á D L O – PÁV streĉis atenton per siaj sukcesplenaj koncertoj /Bach, Beethoven, Dvořák, Brával k. a./ Ni rekomendas, ke li koncertu ankaŭ en eksterlando. Landaj asocioj mem aŭ pere de vialandaj koncertagentejoj aranĝu turneojn de tiu ĉi juna artisto – perfekta esperantisto. Altan nivelon ni garantias. Skribu rekte al s-ano P. Sádlo-Páv, Praha I-182, Ĉeĥoslovakio. Represo petata!

---

NIAJ GEAMIKOJ EN B R N O. La 10-an de aprilo en spegula salono de hotelo Slovan prezentis sin sub arta gvido de prof. Vilibald Scheiber pluraj artkantistoj kaj artmuzikistoj honore al la Majstro. La programo, malfermita per la Espero kaj prelego de J. Vondroušek, enhavis juvelojn de Bach, Ĉajkovskij, Glinka, Mozart, Puccini, Schreiber, Smetana kaj Verdi. Gratulon al la esperantistoj en la moravia ĉefurbo.

---

NIAJ GEAMIKOJ EN O L O M O U C ankaŭ montris sian alton per la Vespero, dediĉita al Wolfgang Amadeus Mozart, la 27-an de marto 1956. Eminentaj artistoj de la Opero /ĝia ĉefo Iŝa Krejčí, J.

Bošínová, Draĥ. Královcová, Vl. Ott, Zdeněk Švehla kaj la orkestro sub la dirigento Karel Moor /prezentis al la kontentega publiko ĉefverkan mozaikon de Mozart . La esperantisto jen moavia metropolo dokumentas, ke ili kapablas perfekte organizi eĉ tiel grandstilajn entreprenojn, kiujn povas envii ĉiu multe pli granda urbo. Laŭdon kaj dankon al ili!!!

---

### **Praha-ek-1956-37-07**

BULTENO PRAHA 37-1956

- 07 -

NIKSOVIRO, fabela, homsimila estaĵo vivanta en lagoj kaj riveroj, estas elstara figuro en fabeloj kaj rakontoj de multaj nacioj. Ĉi tiu akvoviro fariĝis nun objekto de gravaj studo kaj atento de scienca kunlaborantino de Slava Biblioteko en Praha Dr-ino B. Šretrová, membro de nia klubo. Por granda verko, kun ŝi preparas, estas urĝe bezona kompara materialo el diversaj landoj, laŭeble el multaj literaturoj de tuta mondo. Prezentas sin bonega okazo por pruvi utilecon de Esperanto en similaj kulturaj servoj. Ni kredas, ke helpe de Esperanto la esplorado povas fariĝi grandskala. Kun fido je hlepo ni turnas nin al ĉiuj niaj eksterlandaj legantoj kaj amikoj: Skribu al ni, kia estas la NIKSOVIRO en viaj naciaj fabeloj kaj rakontoj! Traduku, aŭ rakontu ian nacian fabion en kiu niksoviro aŭ simila akva homo aperas. Diru al ni, kiel aspektas niksoviro de viaj fabeloj. Per kio li diferenciĝas de la homo – kiel li estas vestita, kiel li vivas, kion li faras, per kio li okupiĝas, kia estas lia viva familio? Ĉu li havas edzinon, infanojn kaj ĉu li estas la sola homsimila estaĵo en akva regno, aŭ ĉu estas ankoraŭ aliaj estaĵoj homsimilaj! /Akvoferoj, najadoj kaj similaj/. Ĉu niksoviro aperas ankaŭ en viaj literaturo, prozo, poezio, en kantoj, teatraĵoj, en operoj? En arto pentra aŭ skulpta? Aldonu ĉion kion vi opinius por ni interesa. Sendu bildetojn, se ili estas akireblaj. Etnografian materialon vi povas sendi en lingvoj: angla, franca, germana, Hispana, itala, pola, rusa, esperanta kaj ĉeĥa. Ĉiujn kontribuojn kaj la korespondajn direktu al s-ano Dr. Bohumila Šretrová, Jungmannova 9., Praha II., Ĉeĥoslovakio. Pli enhavajn sendaĵojn sendu registrite! Ĉiuj esperantaj gazetoj estas petataj afable represi ĉi tiun artikolon.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

---

„EKIK“ – Esperantaĵojn kolektanta internacia klubo – fondiĝis jam fine de 1953 j. en Usono. Ĝi havas membrojn en multaj landoj de la mondo. Celo de la klubo estas membrigi esperantistojn, kolektantaj objektojn, kiuj rilatas al Esperanto. Konservado kaj studado de diversaj esperantaĵoj montriĝas tre necesa. Krome ĝi estas interesa, kleriga kaj eduka. La unuaj esp. gazetoj, libroj, glumarkoj kaj alia propaganda materialo estas daŭre tre gravaj dokumentoj por funda ekkono de la esperanta historio. La membreco en EKIK helpas al pli facila havigo de malnova kaj nuntempa esp. materialo pere de klubo organo „La glumark-kolektanto“ kaj la konsulta literaturo jam ekzistanta aŭ eldonata. Interesatoj pri EKIK skribu al landa delegito s-ano Dolfa Bartošík, Na Černém vrchu 31, Praha XVI. Por respondo aldonu afrankon!

---

SOMERA ESPERANTISTA TENDARO 1956

„En la junulara rond' estas mia tuta mond',  
estas mia tuta koro, mia sola ĝoj'.

Ha, ho, hahoj, mia sola ĝoj!“

Jen vortoj de kanto, kiu elŝprucis en unu el la someraj lernejoj de la esperantista junularo en ĈSR; Gi iom redonas la etoson de la aranĝo, konata jam de kelkaj jaroj sub la fiera nomo „Somera Esperantista Tendaro /SET/. Okazis en la tempo, kiam la landa asocio devis esti likvidita, ke nia junularo kuraĝe starigis SET por edukado de juna esperantista generacio, en la sino de l' naturo. Tri celoj kuniĝas tie: a/ instruado de la lingvo, literaturo kaj historio, b/ agrabla pasigo de libertempo, c/ cementigo de bona junulara kolektivo.

Nunjare denove okazos SET, en du etapoj /eble eĉ tri/ de 15.7. ĝis 11.8. /25.8./ en profundaj sileziaj arbaroj apud la rivero, sude de Žimrovice /fervojestacio Hradec u Opavy, 9 km/, zorge de la E-Rondeto de Domo de Kulturo en Opava. Denove viglos dum semajnoj la tenda vilaĝo, denove oni studos antaŭtagmeze kaj ĝuos la naturon kaj sportojn posttagmeze, por dediĉi la vesperojn al kantado, prelegoj kaj ludoj en la ĉarma medio de tendara fajro. Denove sonos laŭte Esperanto sur la florkovrita arbara herbejo.

La proksima SET estos plej bone organista el ĉiuj ĝisnunaj. Loĝado en dometoj kun litoj kaj tendotegmento. Manĝado kvinfoje en la tago. Dutaga ekskurso per aŭtoĉaroj 27.-28.7. Somera karnavalo. Filmado de la tendara vivo. La kostopor 14-taga etapo estos 200 – 220 Kčs. Fervojrabato 50%. Aliĝoj sendotaj plej baldaŭ al: s-ano J. Kuzník, Rooseveltova 17, Opava.

Ĉu vi hezitas? Venu por sporti, kion publikigis partopreninto de SET, blinda s-ano F. Březina: „Ĝis nun en neniun socio mi estis tiel kontenta kaj feliĉa. La tendaro estis por mi malavara fonto de pura ĝojo. „Interna ideo“ de nia lingvo donis denove dolĉajn fruktojn“.

Maj.

MEMKRITIKO

Laŭ la natur  
histriko foje pikas;  
la juna hom',  
nu, ofte tro kritikis...

Ĉu estis vi  
de speco ne diboĉa?  
Jes, ankaŭ mi  
ne mortos senriproĉa.

Sen ia dub'  
mi ŝatus bonkondukti,  
kaj sen neces'  
kun vento ne disputi.

Sed pro la Ver'-  
kaj laŭ hereda doto  
de l' fama gent'-  
mi estas Don Kiĥoto...



FERVOJISTA ESPERANTO-FERIOSEMAJNO en Vieno de la 17-a – 22-a de septembro. La Aŭstria fervojista Esperantista Fakgrupo /IFEF-Sekcio Aŭstrio/ invitas siajn esperantistajn kolegojn kaj ties familianojn el ĉiuj landoj al partopreno de feriosemajno en Vieno. Detala programo estos baldaŭ diskonigita. La Ĝeneraldirekcio de Aŭstria Fervojoj forte akcelas la aranĝon kaj konsentis jam disponigi apartan motorvagonon por ekskurso sur la mondfama fervojo al Semmering.

---

ESPERANTO EN SSSR. La 19-an de aprilo estis organista lekcio en muroj de regiona biblioteko de Lenin en urbo Tula: „La problemo de internacia helpa lingvo.“ Prelegis Doktoro de filologiaj sciencoj profesoro E. A. Bokarev, vicdirektoro de la Instituto de lingvoscienco de la Scienca akademio de USSR. La lekcio vekis grandan intereson. Ĉeestis plejparte nestudenta junularo kaj kvin malnovaj geesperantistoj ekde 1919j. La lecion organizis la Domo de kulturo de la urbo Tula, kies administracio aŭskultis ĝin kun intereso.

Por Bulteno de EKP Elis Kiselev

---

REKTA KORESPONDADO AL HISPANIO RENOVIGITA. Kurioza stato inter poŝtoj hispana kaj ĉeĥoslovaka malaperis. Dum pluraj jaroj ne estis el nia lando eble sendi poŝton direkte al Hispanio. Ni devis nur konstati, ke hispana poŝto liveris al ni poŝtaĵojn de niaj esperantaj amikoj el Hispanio tute senĝene. Nun nia poŝto ankaŭ akceptas sendaĵojn por Hispanio.

---

### **Praha-ek-1956-37-09**

BULTENO PRAHA 37-1956

- 09 -

GRAVA ATENTIGO POR ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ! Laŭ dekreto de ministerio por komunikado / j.zn. ÚS/12-17758/56 el 25-a aprilo 1956/ ne plu estas necese leteron aŭ poŝtkarton adresitan al eksterlando porti al poŝta giĉeto kaj prezenti sian legitimilon. Nun sufiĉas meti tian korespondaĵon en poŝtkeston. Grave estas, ke ĉiu tia poŝtaĵo surhavu ankaŭ la adreson de forsendinto.

---

RADIO IBRA elsendas el Tanger, Afriko la 29-an de majo 1956 je 20-a horo de bone konata al ĉeĥoslovaka esperantistko /ŝi preparas novan viziton de Ĉeĥoslovakio dum nunjara aŭtune/. Pri aŭskultado raportu al Ibra Radio, Box 821, Stockholm, Svedjo.

---

HEROLDO D ESPERANTO. Plena duono de abonpagintoj de Heroldo ne ricevis de ni la kvinan numeron de tiu ŝatata gazeto. Ni tuj reklamaciis la ne alvenintan sendaĵon kaj atingis nin jam la sciigo, ke ĝi estas survoje.

---

BUDHANOJ kaj tiuj, kiuj okupiĝas pri budhismo aŭ aliaj asiaj religioj estas petataj sendi siajn adresojn al: s-anino M. Králová, nádraží Strakonice, ĈSR.

---

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO malfermis en Praha Teritorian oficejon por ĈSR. Ĝia adreso estas tiu sama kiel de nia Klubo kaj de nia klubestro. Estas do eble aliĝi al UEA. Sufiĉas simpla poŝtkarto, sur kiu krom klara adreso diru al ni jaron de via naskiĝo, de via esperantiĝo, nomon kaj adreson de esperantista klubo, rondo, grupo aŭ rondeto, en kiu vi estas registrita. La kotizoj: MA Kĉs 50 /membro abonanto/ ricevas membrokarton, servkuparon, jarlibron kaj la revuon ESPERANTO. MJ /membro-jarlibro/ pagas Kĉs 20 /ne 10 Kĉs, kiel erare aperis en pasinta BULTENO/ ricevas ĉion, kiel MA, sed NE la revuon! Aliĝojn akceptas Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

---

EL LA NOVAJ LIBROJ. Nia koro ĝoje ekbatis, kiam ni ricevis en la manon la novan eldonon de la ĉefa poemverko de Adam Mickiewicz SINJORO TADEO en la Esperanta traduko de Antoni Grabowski. La libron kun granda pietismo reeldonis „Polonia“ en Varsovio 1955 okaze de la centa datreveno de la morto de la poeto. Plej bona papero, plej bona senerara preso, tola bindo, 333 paĝoj plus 12 ilustraĵoj. Kaj la prezo estas nekredeble malalta: 1,50 dol.

Tiu ĉi „nobelia historio“ el la jaroj 1811 kaj 1812 apartenas ne nur al la klasika trezoro de la pola (pela?), sed ankaŭ de la Esperanta literaturo. La traduko mem.farita dum la unua mondmilito per majstra mano de Grabowski, la „patro de la Esp. poezio“, prezentas gigantan fortostreĉon kaj estas neelĉerpebla fonto de instruo por la adeptoj de la versarto.

Estas ja vero, ke la posta evoluo de la literatura lingvo ne akceptis kelkajn el la formoj, kiujn proponis la tradukinto /ekz. la pluralajn vortkunmetojn laŭ la modelo „homoj-amaso“/. Kaj tamen certe ne trovus aprobon, se iu volus nun e nu runu verson ŝanĝi en ĉi tiu al la esperantistko kara libro. Sed unu deziron ni tamen esprimas: Se la polaj samideanoj iam preparos la trian eldonon, ili konsideru almetan de komentario ne nur pri la originalo, sed ankaŭ pri la tradukverko de Grabowski, en iu oni inde pritaksus lian laboron kaj klarigus la esprimojn, kiuj ne estas troveblaj en la nunaj leksikonoj. Estus ankaŭ tre utile, se oni aldonu s i s t e m a n skizon de la historiaĵoj, pri kiu la libro temas. Ni gratulas al la polaj samideanoj, kaj por la niaj ni esprimas la esperon, ke ni povos anonci la aĉetebilon de tiu ĉi havinda klasikaĵo. Ĝus nin atingis la informo, ke la libron liveras po Kĉs 16 Klubo Esperantista en Brno, kien sendu viajn mendon kaj monsumon.

- - - -

### **Praha-ek-1956-37-10**

BULTENO PRAHA 37-1956

- 10 -

NÁCHOD: Esperanto-rondeto MEZ vikle laboras. La 7-an de aprilo aranĝis lokaj esperantistoj GAJAN VESPERON en kultura ĉambro de fabriko MEZ. Altnivelan Zuzan programon prizorgis s-anoj Bures, Bendt, Lepš, Hopner, „gramofon-orkestron“ gvidis Novák, alvenintojn bonvenigis s-anoj Novák kaj Žid. Vespero pasis en amika amuzado. Partoprenis preskaŭ 40 personoj, parte neesperantistoj, kiuj miris pri bonsukcesa aranĝo kaj nome pri amikeco de tieaj samideanoj. Koran gratulon!

NOVÁ PAKA: Nova rondeto fondita de T. M. Bohun, kiu samtempe gvidas Ĉe-metodan kurson al grupeto de novaj interesuloj.

RUMBURK: Kurso por komencantoj /10 personoj/, krome kurso por progresintoj kaj kurso konversacia. Gvidas malnova aktivulo Jan Zemek. Elmontra fenestro sur ĉefa placo kaj stacidoma tabulo informas la publikon pri esperanto. Loka rondeto kunvenadas en distrikta popola biblioteko de Kultura domo.

- - -

NI KOREGE DANKAS al ĉiuj, kiuj per la donacoj celis plifaciligi al ni eldonadon de nia BULTENO. Sendaĵojn da papero ni ricevis de Rejthárková-Hradec Králové, Hršel-Hradec Králové, Závodský-Žilina, Vilémová-Uherské Hradiště, Matieko-Košice. Per mondonacoj subtenis nin: Míčová-Praha Kĉs 26, Th. Čejka-Bystřice pod Hostýnem 50, Dandová-Praha 20, M. en V. 40, Erben-Miletín 1é, M. en Karlovice 16, Nový-Bráník 6, M. en V. 16, Zemek-Rumburk 6, Fleischhansová-Veselín n. Luž. 20, Hajzok-Bratislava 10, Novotn-Hlušovice 5, Slávek-Praha 20, Ungrová-Neratovice 30, Frantl-Opava 15, Mazáč-Předmostí 12, Lička ZK VŽKG-Ostrava 15, Odehnal-Karviná 20, Luzar-Kyjovice 8, ROH Správa ostravské dráhy Olomouc 6, Suchý-Žďár n.Sáz. 12, Jandík-Prostějov 10, Kuzník-Opava 15, Zemanová-Libnič 26, Belda-Tanvald 10, Sekotová-Poděbrady 5, Žahourková-Polička 16, Pour-Dymokury 4,50. Elkorajn dankon al ĉiuj!

- - -

DEZIRAS KORESPONDI:

ĈEĤOSLOVAKIO: 13-jara entuziasma junulo Sáša AMBROŽ, Trojická 1, Praha II. Eksterlandaj gejunuloj indigu nian novan kursanon pe PI.

POLLANDO: studentino Danuta BASZOSYŃSKA, Stalina 46 OPOLE – pri ĈSR kaj ĝia popolo, pri kulturo, literaturo, filmo, teatro.

ĈEĤOSLOVAKIO: S-ano Standa Šimek, 560, KRUPKA apud Teplice-lázně v Č. interŝanĝas PI kaj PM.

FRANCIO: S-ano Jack SOYEUX, 55 rue Lardin de Musset ANGERS M. et L. 20-jarulo deziras korespondi ???.

POLLANDO: Pri nuntempaj arabaj dialektoj en Magreb /Norda Afriko/ deziras korespondi kun fakuloj kaj studentoj s-ano Wojciech DEMBSKI, ul. 3. Maja N. 15 /p. 257 KRAKÓW.

---

S-ano Jaroslav Schumann el Praha sincere dankas al la firmao COSMOPHARMA el Amsterdam pro la afabla alsendo multhelpa medikamento.

---

LANŽHOT: píssemn kurs esperanta asi pŭl roku za Kčs 30 povede se zájemci Fran Svačina, učitel esperanta, Lanžhot, okr. Břeclav.

---

-----  
Laŭbezone eldonas ESPERANTISTA KLUBO ĉe Osvětová beseda en Praha 2.

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá tř. 10, Praha I.

Respondecas pri enhavo: Josef Vítek, Jungmannova 24/I., Praha II.

Redakciaj telefonoj: Šustr 63 464, Vítek 23 83 23.

---

## TKKE INFORMAS

N-ro 4. Major 1956

Aperas laŭbezone.

### LABORKUNVENO EN PODĚBRADY.

Esperantista rondeto ĉe O. L. Knihovna kore invitas gesamideanojn al sia unua laborkunveno, kiu okazos la 3-an de junio 1956 /dimanĉe/ en restoracio Bílá růže /tuj ĉe la riverponto/. Programo: Malfermo de la kunveno je la 9-a horo kaj salutoj de la gastoj. Josef Vítek raportos pri la situacio kaj progreso de Esperanto en la mondo, prof. Josef Kožený pri Esperanto-movado en ĈSR kaj Jaroslav Mařík pri la Junularo kaj Esperanto. Dum la kunveno kulturaj enmetaĵoj. Komuna tagmanĝo. Posttagmeze trarigardo de la urbo Poděbrady kaj trinkado de saniga minerala akvo. La lokaj gesamideanoj estos je dispono. Kiu samideano dezirus alveturi jam sabate, devas sin anonci minimum ĝis la 18-a de majo por rezervi al li hotelĉambron. Dum jino estas jam plena sezono en banejo Poděbrady kaj la hoteloj estas ordinaraj tute okupitaj. La tranokton mendu kaj informojn petu de Fr. Pytloun, Jungmannova 29/I, Poděbrady.

---

### SEMINARIO EN TŘINEC.

En la tagoj 4a – 10 a de junio okazos esp. seminario en la silezia urbo Třinec. Partoprenantoj ĝuos 50%-an fervojrabaton. Ni bonvenigos sincere kaj plensate ĉiujn vizitantojn kaj montros al ili la konatan belecon de nia regiono. Probable estos la tradicia ekskurso al Čantorya kaj tie la remonto kun polaj samideanoj. Aliĝojn akceptas ĝis la 15-a de majo Anna Milatová, Husova 304, Třinec.

---

DOKUMENTAJ LETEROJ DE LA AKADEMIO DE SCIENCOJ. Esperantistoj en nia ŝtato baldaŭ estos ekipitaj per multobligitaj ĉi gravaj dokumentoj, kiujn, pro ilia amplekso, ni nepovis ĝis nun pretigi. Ni esperas ilin aldoni al la venonta numero de TKKE INFORMAS.

----

ESPERANTO IOM POST IOM REAKIRAS SIAJN POZICIOJN en nia ŝtato. Niaj funkciuloj en Bratislava kaj en Praha nun traktas kun oficialaj instancoj partiaj kaj ministeriaj kaj esperas, ke jam tre baldaŭ povos al vi anonci ĝojgajn novaĵojn, kiuj forigos ĝisnunajn malfacilaĵojn. Tial pacience ni akceptis la Saigon de la Kancelario de nia Ŝtatprezidanto, laŭ kiu la kulturministerio ankoraŭ por la kuranta jaro ne rekomendis nian partoprenon al UK kaj alie. Varsoviaj amikoj informas nin, ke oni ne fiksis ankoraŭ la precizan daton de la konferenco. Tuj post la ekscio de la detaloj pri Varsovia konferenco ni komencos trakti kun nia vojaĝoficejo pri komuna vizito kaj ni urĝe petas la esperantistaron ne malfaciligi nian traktadon per rekta skribo al koncerna oficejo.

----

NI GRATULAS al la ĝenerala sekretario de UEA prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu /kiel unua eksterlandano/ akiris la pacpremion 1955 de la Paca asocio en Stokholmo pro la meritoj pri disvastigado de la internacia lingvo kaj pro la laboroj dum la Ĝenerala konferenco de UNESCO en Montevideo 1954.

----